**AVENO #52 - Verdaj Partioj & Esperanto - 2026**

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazaĵoj, rilato de Verdaj Partioj kun Esperanto.

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

Se vi estas membro de verda movado (en senco de Verdaj Partioj) kaj ĝis nun ne estas membro de AVE bonvolu sendi ret-mesaĝon al la sekretario de AVE: AVE@verduloj.org
Gravas scii kiom ni estas.
 - - -
Ligiloj de Verdaj Partioj al Esperanto:

https://europeangreens.eu/charter-of-the-european-greens/#translations

= = = =

= = =
2026-07 Bonvenon al Moldavio kaj Armenio
La Respubliko Moldavio komencis 2022 la agadon aliĝi al EU. La prezidentino Maja Sandu preferas ke ankaŭ Transnistrio finfine estu liberigita de la rusa armeo, kiu restis en tiu mallarĝa regiono oriente de la Dnjestro.
Intertempe dependas Transnistrio pli de moldavio kaj EU ol de Rusio – ankoraŭ komplka situacio. Detaloj (informoj de fonduso la germana FDP):
https://www.freiheit.org/de/rumaenien-und-republik-moldau/transnistrien-ein-dorn-im-moldauischen-auge
 - - -
Malgraŭ granda malplimulto en la parlamento kiu preferas resti partnero de Rusio, la ĉefministro Nikol Paŝinjan tendencas politike al okcidenta Eŭropo; samtempe ekonomie ludante ligo-landon inter ambaŭ blokoj. Tiu tendenco estis subtenita ĉar Rusio ne povis malhelpi la perdon de la Montara Karabaĥ-regiono. Tiu delonge estis ĉefe loĝata de armenoj, sed formale (dum Sovetio) estis aŭtonoma regiono de Aserbajdŝano.
2025 Donald Trump sukcesis konvinki ambaŭ landojn al paciĝo.
 - - -

2026-04-15 Gratulon al la hungaroj kaj al Europanoj
Feliĉe sufiĉe granda plimulto voĉdonis por Peter Magyar, kiel sekva ĉefministro.
Tiu nun pledas ke la aktuala prezidento rezignu pri sia posteno, ĉar li ne malhelpis la korupcion dum la regado de Orban.
https://www.tagesschau.de/ausland/ungarn-magyar-reformen-100.html

La indico pri korupcio de Hungario estas 42 , tial troviĝas je n-ro 82 (de 180), kune kun kelkaj afrikaj ŝtatoj, kaj je la fino de la EU-ŝtatoj.
(indico 100 estas sen ajna korupcio, 90 estas por Danlando, la malplej korupta lando de la mondo; la indicoj de Ukrainio* kaj Rusio troviĝas je 35 kaj 22, respektive. Post 2022 Ukrainio jam pliboniĝis, Rusio malboniĝis).
https://eo.wikipedia.org/wiki/Indico_de_perceptata_korupto

Komento: mi notis Ukrainion kaj Rusio, ĉar ofte la defendantoj de la politiko de Putin, kun kiuj ni parolas vid-al-vide de la rusa konsulejo en Germanio , argumentas ke Ukrainio estas korupta lando. Ankoraŭ jes, sed Rusio multe pli korupta – faŝisma, totalitarisma

oligaĥio.
 - - -

2026-03-26  Nederlando - Kunagado de Verduloj kaj Progresemuloj

Vula Tsetsi, kunprezidanto de la Eŭropa Verda Partio, diris: “Ni varme bonvenigas **Progressief Nederland.** Post multaj jaroj da kunlaboro, ili atingis komunan komprenon, ke kune ili povas fari veran diferencon. Nederlando bezonas fortan progreseman forton kun klara verda tagordo. La nederlandaj balotantoj jam montris sian subtenon pasintan merkredon, kiam **GroenLinks - PvdA** kun entuziasma mobilizado sub la gvido de Jesse Klaver, ricevis la plej multajn voĉojn tutlande kaj venis unua en Amsterdamo, Roterdamo, entute sep el la dek plej grandaj urboj. Ni antaŭĝojas daŭrigi nian laboron kune.”

https://europeangreens.eu/news/european-green-party-welcomes-progressief-nederland/

 = =
2026-03-22  Francio - elekto de komunumoj - Verduloj gajnis plurloke, sed ankaŭ malgajnis. Gratulon al Grégory Doucet, iama kaj nuna urbestro en Lyon, krome en Grenoble kaj Tours

En Marseille gajnis la socialisma urbestro, ili kunlaboris kun la Verduloj en komuumna listo.

Bedaŭrinde en kelkaj grandaj urboj ili ne (ofte preskaŭ ne) sukcesis teni la unuan lokon. Sed entute Les Verts ludos rolon en multaj urboj de diversaj grandecoj. Pli da detaloj ekzemple jen – en la germana. Heinrich Boell estas la politika asocio kiu rilatas al Bündnis 90 / Die Grünen en Germanio.

>  boell.de/de/2026/03/26/kommunalwahlen-frankreich-ein-nationaler-stimmungstest

Kaj en la franca, multe pri la elektokampanjo:
>  municipales2026.lesecologistes.fr/

 - - -

2026-01-15   Verda Partio en Aŭstrio varbas por Esperanto-Centro
Sur ilia retejo vi trovas koncizan informon kial Esperanto estu la tutmonda lingvo de Verdaj Partioj.
https://freda.at/gruenes-gedaechtnis/esperanto-sprache-der-gruenen/

- - -
AVE kunlaboras kun la Verdaj Partioj kaj iliaj kontinentaj kaj la globala asocioj.

Ekzemple kun la asocio por la Tutmondaj Verdulaj Partioj / Global Greens
Ni tradukis ilian ĉarton kaj ĝi troveblas sur ilia retejo:

> globalgreens.org/about/charter/
 = = =
2026-01  Verda Partio en Britio
Ili engaĝiĝas sur la komunumoj kaj dum duona jaro multiĝis la membroj de 70 al 190 mil.
(el blogo de Greens European Foundation:  gef.eu )

 - - - fino